

I. F. E. A.



ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italia)



Informal Bulteno

ITALIA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071

REDAKTORO: Glimelli p. l. Germano

Nº 8 - 9 kaj 10

Aùguste - Septembre kaj Oktobre 1958

8-a Jare

COMUNICATO

Con la chiusura dell' VIII° Congresso Nazionale della "Itala Fervejista Esperante-Asocio" tenutesi a Palermo il 24 agosto 1958 nel quadro del "XXIX-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto", si é aperte il nuove anne finanziarie 1958-1959.

Preghiamo vivamente i nostri Soci di versare le quote al più presto.

Per agevolare il versamento delle quote sociali é state aperte il Cente Corrente Festale nº 8/24094 intestate a: "Itala Fervejista Esperante-Asocio" - "Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti" Via Donato Creti, 61 Bologna (131). Il bollettine per il versamento nel C.C. é allegato al presente bollettine e pertanto i Soci possono mettersi in regola immediatamente usufruendo del Citato C.C.

In conseguenza delle decisioni prese durante il Congresso di Palermo, le quote sociali per il 1959 sono le seguenti:

- Associazione all'I.F.E.A. - all'I.F.E.F. - all'U.E.A. ed alla F.E.I. con abbonamento alla rivista "L'ESPERANTO" £. 1.150,- annue
- Associazione solamente all'I.F.E.A. ed all'I.F.E.F. (per quei Soci che pagano le quote di associazione alla F.E.I. ed all'U.E.A. direttamente e tramite i Gruppi Esperantisti locali) £. 550,- annue

Si pregano vivamente i Soci che non hanno ancora pagate le quote sociali per il 1958 e che continuano a ricevere il presente bollettine, di trasmettere con ogni urgenza le quote per il 1958 da noi già versate alle associazioni di cui siamo aderenti (U.E.A. - I.F.E.F. e F.E.I.) oppure trasmettere le loro dimissioni con semplice cartolina postale.

EKSPOZICIO

De la Fervejista Esperantista Rondo Nederlanda, ni ricevis jenan sciigon:

Per la propagande per Esperanto ni aranĝas ĉiujare ekspediciojn. Flanke de la Esperanto-materialo ni ĉiam aranĝas iom eksterordinaran, el kie la vizitantoj povas vidi laoblecojn, kiuja oni povas atingi per Esperanto en la tuta mondo.

Ĉi tiun jaron ni mentris al ili kartejn kun homoj en nacia aŭ regiona kestumo. Ĉi tiujn kartejn ni ricevis el multaj landoj.

En 1959 ni volas mentri al ili bildkartojn kun FERVOJAJ STACIDOMOJ. Ni bezonas per niaj ekspedicioj bildkartojn kun Fervejaj Stacidomoj el la tuta mondo.

Rekompenco ni sendos al ĉiu, kiu sendas al ni karton, belan karton de nia lando.

Adrese: J. J. LABORBUS Kenaustrate 26 UTRECHT (Nederlande)

XXIX-a ITALA NACIA KONGRESO DE ESPERANTO

PALERMO - de la 23-a ĝis la 28-a de Aŭgusto 1958

Ankoraŭ unu fojon ni travivis kelkajn tagejn en Esperantujo kaj en unu el la plej belaj lekoj de la mondo, kiam ni partoprenis al la XXIX-a Nacia Kongreso kiu okazis en Palermo, ĉefurbo de Sicilio.

Jam sur la kaje de la stacidomo en Messina ni trovis diversajn gesamideanojn al kiuj ni prezentis fraŭlinon kiu ni varbis dum la ŝipveturado de Napeli al Messina.

Sabaten vespere post la alveno al Palermo kaj la enloĝiĝo el la hotelejo ni partoprenis la unuan manifestacion de la Kongreso: la interkonan vesperon okazintan en la "Circolo della Stampa" ĉe la "Teatro Massimo". Post la ricevo de la dokumentoj kaj la salutoj al multaj gekonatulejoj ni translekiĝis sur la terason de la hotelejo "Sole" per danci ĝis la malgrandaj heroj.

Dimanĉen matene okazis la katolika diserve laŭ la Greka-rite en la fama preĝejo de la "Marterana". La pastro klarigis al ni la disvolvon de la Meso en tiu rite, diferenca de la kutima katolika rite, kiu reiras al la pratempa maniero. Dum la diserve la Esperantista Pastro legis esperantlingvajn preĝojn kaj memoris Pastron Carelfi, kiu faris Meson dum la antaŭaj kongresoj kaj mortis antaŭ kelkaj monatoj. Post la diserve ni vizitis la apudan preĝejon "S. Cataldo", nun sub la regado de la Kavaliroj de la Sankta Tombo.

Je la 10-a hero la kongresanoj kunvenis en la verdstele ornamita "Salone delle Lapidì" en la Urbedomo kie okazis la Solena malfermo de la kongreso. Je la Prezida table ĉeestis la Vicurbestro de Palermo, D-ro Abate kaj Adv. Bescarino (Prezidanto kaj Vicprezidanto de la Organiza Komitato) kaj Prof. Canute Prezidanto de U.E.A. kaj de F.E.I.; en la unua vico la plej gravaj civilaj, militaj kaj ekleziaj aŭtoritatoj de Palermo.

Post la salutoj de la Organiza Komitato kaj de la Vicurbestro okazis la salutoj de la eksterlandaj gastoj kiu venis de: Aŭstrujo, Danlando, Francujo, Jugoslavio, Turkujo. Laste Prof. Canute faris inaŭguran paroladon. Post luksa refreŝigaĵo en la belegaj salonoj de la Urbedomo la kongresanoj iris eksteren ĉe la "Preteria" fento per la tradiciaj fetoj.

Posttagmeze je la 15-a hero okazis la VIII-a Nacia Kongreso de la Itala Fervejista Esperanto-Asocio (I.F.E.A.), sub la Prezido de Kav. Zacceni. Partoprenis sufiĉa nombro da fervojistoj, delegitoj de la grupoj de Belegna, Verona, Voghera, Udine, Palermo, Milano kaj Torino. Ĉeestis ankaŭ la Vicprezidante S-ro Ceroni el Verona kaj kelege Rietta el Palermo, brila Sekretario de la Organiza Komitato de la XXIX-a Itala Nacia Kongreso.

Post la legado de la aliĝoj inter kiuj tiuj de I.F.E.F. kaj de la Polaj Fervejistoj kiuj starigis sian Nacia Fakan Asocion, la Prezidanto Kav. Zacceni raportis pri la aktiveco de la jaro jam pasinta.

La Sekretario Gimelli raportis pri la 10-a Jubilea Kongreso de la I.F.E.F. kiu okazis dum majo en Aarhus (Danlando); kaj denis infermojn pri la fervojista kongreso kiu okazos dum la venonta majo en Linz (Aŭstrujo). La faka temo per tiu Internacia Fervejista Esperanto-Kongreso estas "La evoluo de la horaro. En la sama tempo okazis ankaŭ la junulara kunveno.

Je la 18,30 hero ni forveturis al Monreale kaj vizitis la belegan katedralon kaj la neforgeseblan klaŭstron; poste la reprezentanto de la Urbestro regalis la 300 gekongresanojn per glaciaĵoj kaj folkloraj spektaklo en la ĉefa place. Peste ni iris al la hipodromo kie senpage ĉeestis la ĉevalajn noktajn kuradojn.

Dum la sekvantaj tagoj, lundon 25-an kaj mardon 26-an okazis la ekzamenoj kaj la kunsidoj de F.E.I., de katolikejoj (I.K.U.E.) kaj de instruistoj (I.L.E.I.).

Dum la laborkunsidoj de F.E.I. oni elektis Adv-on Bescarino kaj D-ren Bèriene kiel honorajn membrojn de F.E.I., kaj oni decidis altigi la ketizen tiamaniere: Aŝocia ano de Grupe £. 600,-, individua membro £. 800,-, familia membrø (sen revuo) £. 300,-, junule ĝis 25 jarej £. 300,-. Laste sub propene de Ing. Nanni, la kunveno aliĝis al la iniciato de Adv. Bagnule rilate al la monda tago pri la universaleco de la Kulturo, dum kiu ne povas foresti la Esperanta lingvo kaj Ideo.

Lunden vespere okazis la kongresa bale en la sugestia dancejo "La Terre" en Mendelle Lido kie inter la venteto de la maro kaj la parfumo de la floroj la kongresanoj dancis al melodie de brila orkestrete kiu ludis ankaŭ Esperantajn kanzenojn.

Marden vespere la Komitato de la Mendela Somero regalis la parteprenatojn per refreŝigaĵo en la luksa "Hotel Palace" en Mendelle kie okazis ankaŭ dancejoj.

Merkredon la 27-an ni rendiris tra la "Cenca d'Oro" kun socia tagmanĝo en "S. Martine alle Scalè". Vespere okazis la fermo de la kongreso (en la "Circolo della Stampa" kiu ĝentile gastigis la kongreson) kun la kanto de la Espero.

Vere neferĝesebla estis la postkongresa ekskurso al Segesta, Trapani kaj Erice kie ni ĝuis belegan panoramon kaj nekutiman trankvilecon.

Bedaŭrinde la tempo fluis kaj ni devis reveturi hejmen ĉar nia libertempo finiĝis kaj la kutima laboro vokas nin.

Fine ni sentas nin devigataj danki D-ren Abate, Adv-on Bescarino, S-ron Riotta, Rag. Parisi kaj la aliajn helpantojn kies nomojn ni forgesis, kiuj brile kaj senlace laboradis per la bonsukcese de la kongreso kaj ni esperas ke ilia laboro donos brilajn fruktojn per la disvastigo de Esperanto en la bela Sicilio.

Germano Gimelli

===== RAPORTO PRI LA 43-a UNIVERSALA KONGRESO EN MAJENZO =====

En Mainz, la urbe kiu donis naskiĝon al granda Johano Gutenberg, eltrovinto de la presarto, okazis la 43-a Universala Kongreso de Esperanto; kiu ne nur atingis la sukcese de siaj 42 antaŭuloj sed, en kelkaj rilatoj, eĉ pli bone sukcesis.

La plej konsiderindaj okazintaĵoj de tiu kongreso estis: unue, ke la urbestro de tiu urbe estas esperantisto, kaj ke li nen prezidis la Lokan Komitaton; due, ke nia kongresejo estis la fama palaco de la Elektantaj Princej, antikva verko de la Renesanco.

Grandaj verdaj standardoj kaj multkoloraj flagoj en ĉiuj stratoj, kaj placoj, gaje salutis la kongresanojn, entuziasme kunvenintaj el 40 landoj malproksimaj.

1-a tago: Sabato. La interkonatiga vespero ripetigis la scenojn, jam konatajn: ĝojajn ekkriojn, intersalutojn, interkisojn kaj plej vivan kaj gajan babiladon.
2-a tago: Dinanco. Solena inaŭguro en la majesta salonego Zamenhof, de la fama Palaco, mirinde ornamita per fresaj floroj, ekzotaj plantoj, kaj verdaj flagoj, inter kiuj ŝeestis granda portreto de la Majstro.

Antaŭ multnombra plaŭdanta publike (kiu rapide plenigis la planke kaj la galeriojn) la ŝefurbestro S-re Stein, portis la saluton, unue germanlingve al la ŝeestantaj aŭtoritatuloj, poste esperantlingve al la kongresanoj.

Prof. D-ro G. Canuto (kiel Prezidanto de U.E.A.) dankis la urbestron, legis salutotelegramon de la Kanvliero Adenauer, kaj proponis sendi al li dankesprimon. Sekvis parolado de Prof. E. Privat, kaj la salutoj de la reprezentantoj de la Landaj Aŝocioj aliĝintaj al U.E.A. inter kiuj, forte kortuŝis la salutvertejn de la juna nepe de nia Majstro, Ing. Ludoviko Zamenhof. Longa estis la vice de la salutantoj, fermita per sublina Sinfonia-orkestro al kiu sekvis la festparolado de la ŝefa oratoro de la inaŭguroj Prof.D-ro I. Lapenna.

Komence de sia parolado la oratero laŭdis la urbestron S-ron Stein, pro la granda laboro farita favore de Esperante; kaj tute speciale pro la "Enketo pri la lingva problemo en Eŭropo" kiu atingis kuraĝigan sukceson. Lapenna kontraŭbatalas la bilingvismon, kaj ne aprobas la ideon ke Esperanto estas (aŭ fariĝas) Eŭropa lingvo; ĝi sendube estas eŭropa, sed ankaŭ azia, afrika, amerika lingvo: Esperanto estas monda, Internacia Lingvo.

La dimanĉo posttagmeze estis ŝefe dediĉita al diversaj diservoj, kaj vespere okazis du festprogramoj: unue la inaŭguro de la Internacia Somera Universitato, kun prelego de D-ro Lapenna, due, festprogramo honore al la sama Profesoro Lapenna okaze de lia 30-jara esperantistiĝo kaj 20-jara estraraneco de U.E.A.

Por ne tre longigi tiun raporton, mi mallonge resumas la tutan programon de aliaj kongrestagoj, laŭ kromologia vico:

Lundo estis dediĉita al la literaturo de Esperanto, kun prelego de Prof. E. Privat pri William Penn, fondinto de Pensilvanio, kaj proponinto de Eŭropa Parlamento (jam antaŭ du jarcentoj).

Mardo estis tago dediĉita al U.E.A. - Matene, je la 10-a horo, komenciĝis en la salonego Zämenhof, la Jubilea Festprogramo de U.E.A. por festi la Gran Jubileon de nia ĝenerala tutmonda organizaĵo. Malfermis la ceremonion D-ro Camuto; poste Prof. Privat prelegis pri la fondiĝo de U.E.A. kaj pri lia fondinto Hektor Hodler. Poste parolis S-ro Jakob pri kelkaj malnovaj pioniroj kaj S-ro Holmes (Viceprezidante de U.E.A.) pritraktis ĝian aktualan staton kaj fine Prof. Lapenna: la Estontecan de U.E.A.

Merkredo estis tago de novaj prelegoj, de fakkunsidoj kaj kunvenoj (Katolika kunveno, Internacia Esperantista Fervejista kunveno). Posttagmeze je la dua horo oni solene prezentis la verkojn premiitajn en la Belarta Konkurso, kaj je la kvina horo okazis la neforgesebla kora akcepto de la urbestro al pli ol du mil esperantistoj ŝeestantaj en Mainz. 1700 litroj da vino el la urbaj vinberoj donis grandan bonhumoron al ĉiuj partoprenantoj, kiuj multe plaŭdis la urbestron kaj laŭtvoĉe akompanis kantojn ludatajn de la polica orkestro (evidente vino ne kontrastas kun esperantismo!).

Ĵaŭdo estis belega festotago en kiu okazis tri grandaj kaj interesaj ekskursoj: la unua sur la Rejno ĝis Baeharach; la dua al Heidelberg; la tria al Frankfurto, la naskiĝurbo de Goethe kaj de Anna Frank.

Vendredo la kongreso kliniĝis je la fino kaj sabato okazis ĝia solena ferme. Post la saluto de Prezidante Prof. Camuto, la ĉefurbestro Stein mallonge parolis per adiaŭi kaj montris sian kontenton pro la rezulto de la 43-a Univerŝala Kongreso en la malgranda sed gastema urbo Majenco.

Giuseppina Gamberini

LA GERMANA FEDERACIA FERVOJO OKUPIĜAS EN LA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La Germana Federacia Fervojo ne preterlasis la okazon, denove provi sian progresemon rilate la lingvon Esperanto. Laŭ instigo de la Germana Esperanta Fervejista Asocio la fervoja administracio konsentis fari kelkajn aranĝojn. Per saluti kaj konsili la kongresanojn, alvenantaj per fervojo, estis instalata speciala akceptejo en la ĉefstacio Mainz, en kiu deĵoris dumtage kaj dumnokte fervojistoj, donante la unuajn infermojn kaj helpojn al la eksterlandaj gastoj, kompreneble ĉio en la Internacia Lingvo.

Tiu ĉi serve danke estis akceptata, ĉar tiamaniere la fremduloj sentis sin malpli fremdaj. Tiel la Germana Federacia Fervojo montris sin kiel helpanto per ĉiu. En la kongresejo intertempe estis konstruita belegan infermejo flanke de la fervoja direkto Mainz. Varbafiŝoj ekster- kaj enlandaj, modelo de transeŭroptrajno, aŭtomate moveblaj afiŝoj kaj kolorbildej ornamis la fervojan standon en la kongresejo.

Mercredon la fervojistaj kongresanoj havis sian "grandan tagon". Matene ili fakekskursis al la plej moderna eŭropa signalregadejo en Frankfurte ĉefstacio. 40 partoprenantoj el 8 landoj aŭskultis la intereseigan prelegon pri la centra aŭtomata funkciigado de la fervoja trafiko en tiu giganta fervoja centro. Ili havis okazon, mem observi la tiajn deĵorantojn dum ilia labore. Dum la sama tago posttagmeze la fervojistoj en la kadro de internacia fakunside de I.F.E.F. denove kunvenis kun 60 ĉeestantoj el 9 nacioj kaj aŭskultis altnivelan prelegon pri la temo "Raciigado, moderligado, aŭtomatigado de la fervojo", tradukita artikolo de Fervoja Prezidanto Geitmann.

Dum la ekskursita tago ĉiuj deĵorantoj de la fervoja informejo akompanis la specialan trajnon al Heidelberg kaj Michelstadt, survoje helpante kaj konsilante la esperantistajn pasagerejn, kiuj post la ekskurso adiaŭis de ili kun vortoj kiel jenaj: "Unue ni ion timis viajn seriozajn uniformojn, sed poste ni ekkonis, ke vi ne nur estis tre afablaj helpantoj, sed eĉ kavaliroj en la dan- evageno"

Fine oni ne silentu pri tio ke la Germana Federacia Fervojo oficiale delegis kaj pagis ses deĵorantojn dum la tuta semajno, ke ili portis sur la maldekstra maniko orkeleran rubandon kun la enskribo "Esperanto", kaj ke ili ĝisfunde konis sian fakon, tiamaniere bonege reprezentantaj la germanan fervojon kaj la esperantistojn fervojistajn.

Resume el la Bulteno de la Germana Esperanta Fervojista Asocio. GLESSNER

ITALAJ PIONIROJ - D-ro ACHILLE TELLINI

Foje, dumnokte, ne povante dormi (simptomo de maljuneco!) mi pensas al miaj Pioniroj, al kiuj mi multe ŝuldas, ĉar ili longe batalis por havigi al ni novan homarecon; ili sparis nek tempon, nek monon por la sankta idealo, dum hodiaŭ estas iuj el la junaj idealistoj kiuj rifuzas pagi eĉ la etan jar-ketizon al I.F.E.A. Ĉu ili opinias ke nia Asocio ricevas monhelpon de Itala Registaro? Ili ne pensas ke la nura riĉeco de nia Asocio estas la jar-ketizejoj de la geanoj! Rememori nur je kelkaj el la multaj Italaj Pioniroj, estas tasko kiu superas miajn fortojn kaj mi provas nur paroli pri unu el ili, kiu mi havis la bonŝancecon persone koni tuj post la unua mondmilito, kiam nia movado ekkomen- eis revekiĝi post kvar jaroj de letargio, nome pri: D-ro Prof. Achille Tellini.

Dum la unua mondmilito 1914-1918, D-ro Tellini multe laboris por la korespondadoj de kaj kun militkaptitoj (mi posedas leterojn de austraj kaj rusaj samideanoj kiuj petis informojn pri parencoj aŭ amikoj militkaptitaj): D-ro Tellini estas aŭtoro de Esperanto-Itala Vortaro kiu enhavas 13.000 vortojn, plie li tradukis multajn verkojn kaj al ĉiuj li aldonis progresantan numeron, amastatadita de la vortoj: "Esperanta Abele N°... Bedaŭrinde mi povas nur citi iujn el ili: "Blankaj Rezoj" unuakta komedio de Felice Cavalletti; "La idilio de la fento" el la "Rememoroj de ekdekjarulo" de Ipolite Nievo; "Gvidlibro de Urbo Ravenna" (la libro estas riĉe ilustrita pere de fotoj kiuj reproduktas la famajn mozaikojn de la Bazilikoj: S-ta Apolinaro, S-ta Vitale k.t.p.); "Le- ksikona kompare inter lingvoj: Friula kaj Provenca"; "Gramatiko, vocabulari ed exercicis di lenghe internacionāl Esperante" (tiu ĉi libreto valoras kiel maleftaĵo ĉar ĝi povas havi specialan intereson nur por la personoj kiuj stud- esploras pri latinajn lingvojn kaj, laŭ peto, mi jam sendis kelkajn ekzemplerojn al Ĉilio, al Anglujo k.t.p. (1)

En artikolo, aperinta en "Nia Tribuno" (N°32 de I.F.E.F.-a periodaĵo "L'Espe- rante") mi diris ke D-ro Tellini estis la pioniro de la Esperanta movado en Bolonjo, Modena, Mirandola, Ravenna k.t.p. sed mi forgesis aldoni ke li estis unu el la subnemataj dek eminentuloj kiuj fondis la "Italan Katedron de Espe- rante" (la nuna "Itala Esperanto-Instituto") en Bolonjo dum aprilo 1912.

Adv-to Rafaelo BAGNULO, Prof. Pastro Jakobo BIANCHINI, Prof. Klarence BICKWELL, Pastro Modesto CAROLFI, Prof. Demetrio Cossaro, Prof. Aleksandre MAZZOLINI, Pastro Jakobo MIAZZINI, Jozefo SIGNORINI, Ferdinando VERRI kaj D-ro Akilo TELLINI. El la tiu ĉi supra nomliste, hodiaŭ nur unu samideano estas ankoraŭ vivanta (Adv. Bagnulo).

Kiam la Itala Registaro (dum Mussolini-a diktatoreco) malpermesis propagandian lingvon kaj la Grupej estis devigitaj fermi ties sidejojn kaj kaŝi la esperantan materialon, D-ro Tellini diris al mi: "Post multaj jaroj da senlaca laboro, inter korpremoj, malfacilaĵoj, humiliĝoj kaj kelkaj ĝojoj, ploras al mi la koro ne povante plu daŭrigi la disvastigon de nia kara lingvo; mi ne volas ke nia privata biblioteko estu detruiĝinta, ĉar mi arde esperas ke nia movado denove rekomenos antaŭeniri kaj jam mi testamentis, tial ke la tuta materiale fariĝu prepraĵo de la Udine-a Komunuma Biblioteko".

(1) Se iuj el la legantoj deziras ricevi ekzempleron de tiu ĉi libreto, bonvolu skribi al mia nova adreso kaj mi volonte sendos ĝin, ĝis eleerpiĝo.

(daŭrigas en venonta numero)

ZORATTI Angelo

Corso Valentino, 129 Casale Monferrato

R
R A D I O R O M A - E S P E R A N T O F A K O
=====

Casella Postale 320 - Roma (It)

DISSENDOJ EN ESPERANTO - Jare 1958-an

La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,40 (M.E.T.) Ondlongejoj: metroj 30,90 = Mc/s. 9,71, metroj 41,24 = Mc/s. 7,27, metroj 50,34 = Mc/s. 5,96

Prelegantoj: mardo: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA

merkredo: S-ro Luigi MINNAJA kaj Vendredo: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA

Ĉiu merkredo dissende de: Kuriero de Esperanto.

O K T O B R O 1 9 5 8 - a n

969 vendredon la 3-an: Sankta Klara, patronino de la televido

970 mardo la 7-an: Tra literaturo

972 vendredon la 10-an: Leterkesto kaj bibliografio

973 mardon la 14-an: Novaĵoj el Italujo

975 vendredon la 17-an: Grandegaj italaj sciencistoj: Evangelista Torricelli

976 mardon la 21-an: Italaj kanzonoj en Esperanto

978 vendredon la 24-an: Italaj belartaj urboj: Mantova

979 mardon la 28-an: Grandaj italaj poetoj: Francisko Petrarca

981 vendredon la 31-an: Tra Romo: La Siksta Kapelo ĉe Vatikano

N O V E M B R O 1 9 5 8 - a n

982 mardon la 4-an: Salenta duoninsulo en sud-orienta Italujo

984 vendredon la 7-an: Italaj komponistoj: Geatano Donizetti

985 mardon la 11-an: Novaĵoj el Italujo

987 vendredon la 14-an: Leterkesto kaj bibliografio

988 mardon la 18-an: Italaj kanzonoj en Esperanto

990 vendredon la 21-an: Romo kaj fremdaj verkistoj: Chateaubriand

991 mardon la 25-an: Grandaj Sanktuloj: Sankta Benaventura

993 vendredon la 28-an: Italaj belartaj urboj: Reggio Calabria

La Fakestro: L. MINNAJA

DEZIRAS KORESPONDI

Elotretetikista studento 19-jaraĝa Aleksandre Geroovski str. Todor Kablaŝkov, 36 LEVSKIGRAD (Bulgarujo)

44-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Dum la Jubilea Zamenhofa Jare la U.K. okazos en Varsovio (Pollando) de la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto 1959-a